

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 12.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Pošta sparkaso no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendadas.

ESPERANTO EN LERNEJOJN.

Dum tridek jaroj ni penis konvinki la mondon, ke la ideo de arta lingvo helpa ne estas utopio kaj ke Esperanto de Zamenhof plenumas ĉiujn kondiĉojn, kiujn tiurilate oni povus prezenti. Post la grandega kaj neniam sufiĉe priŝatata peno nia kaj de niaj antaŭuloj, la esperantista movado disvastiĝis tiel, ke pri la fina venko de Esperanto oni ne plu povas dubi. Esperanto fariĝis tre grava faktoro tie, kie oni bezonas samtempan rilaton kun membroj de diversaj nacioj, tiom pli, ke la esperantaj organizaĵoj ekzistantaj jam en ĉiuj landoj, principe stariĝas al dispono por ĉiuj kulturaj bezonoj de membroj de aliaj ŝtatoj.

La plej bona atesto por vivkapablo de Esperanto estas ĝia ofta imitado aŭ t. n. »perfektigado« kaj »reformado« de diversaj individuoj kaj kompanioj, kiuj uzante la plej allogajn permesitajn aŭ nepermesitajn reklamajn artifikaĵojn kaj devizaĵojn de progresemo, penas glorigi sian nomon por malprofito de la populareco de Esperanto, kiun ili samtempe kalumnias proklamante ĝin neprogresema, ĉar ĝiaj gvidantoj tro singarde kontraŭstaras nepripensitajn provojn de kelkaj falsaj lingvistoj pri senkaŭzaj kaj nenaturaj ŝanĝoj.

Per sia tridekjara ekzisto kaj uzado en ĉiuj fakoj de la homa pensado, aŭ per sia riĉa literaturo, kies enhaveco preskaŭ egalas la literaturon de malgranda nacio, Esperanto pruvis sian internan valoron. Tial certe estas rajtigita la postulo, ke oni enkonduku Esperanton en lernejojn, ĉu kiel deviga aŭ nedevisa instruaj objektoj. Per tiu ĉi postulo oni samtempe vekas la konsciencon de tiuj, kiuj regas, ĉar oni tiel indirekte postulas, ke ili helpu al valorigo de unu el la plej gravaj partoj de la penadoj tuthomaj.

En diversaj landoj oni prezentis rilatajn postulojn kaj ankaŭ en la Respu-

ESPERANTO DO ŠKOL.

Po tricet let snažili jsme se přesvědčiti svět, že idea umělého jazyka pomocného není utopií a že Zamenhofovo Esperanto vyhovuje všem podmínkám, jež v tomto směru mohou být kladeny. Po obrovské a nikdy dosti oceněné námaze naší a našich předchůdců rozšířeno bylo esperantské hnutí tou měrou, že o konečném vítězství Esperanta nemožno již pochybovati. Esperanto stalo se velmi důležitým faktorem tam, kde jedná se o současné styky s příslušníky více národů, a to tím spíše, že esperantské organizace, existující již ve všech zemích, zásadně stojí k dispozici všem kulturním potřebám příslušníků států jiných.

Nejlepším dokladem životaschopnosti Esperanta jest jeho časté napodobování, či tak zvané »zdokonalování« a »reformování« různými jednotlivci a sdruženími, kteří, používající těch nejlákavějších dovolených i nedovolených reklamních triků a hesel pokrokovosti, snaží se učiniti své jméno slavným na úkor popularity Esperanta, jež současně zlehčují, prohláshující je za nepokrokové, protože jeho vůdcové příliš omezily čelí nepromyšleným pokusům několika lžilingvistů o neopodstatněné a nepřirozené změny.

Svoji třicetiletou existenci a užíváním ve všech oborech lidského myšlení i svou bohatou literaturou, jejíž rozsah se skoro rovná literatuře malého národa, dokázalo Esperanto svoji vnitřní cenu. Proto jistě oprávněn jest požadavek, aby Esperanto bylo zavedeno do škol, ať už jako povinný či nepovinný předmět učební. Tímto požadavkem jest současně burcováno svědomí těch, kdož vládou, neboť se tím nepřímo požaduje, aby přispěli k uplatnění jedné z nejdůležitějších součástí snah všelidských.

V různých zemích byly podány příslušné žádosti a též v republice Československé

bliko Ĉeĥoslovaka tiel okazis. Al la ministro de instruado sinjoro G. Habrman oni sendis petskribojn de de societoj kaj asocioj esperantaj eĉ de instruistaj, ke li enkonduku Esperanton en duagradajn lernejojn. Tiuj petskriboj venis ne nur de Bohemoj kaj Slovakoj, sed eĉ de Germanoj kaj ankaŭ la magiaraj esperantistoj el Slovakio decidigis sendi al sinjoro ministro deputacion kun la sama postulo.

Al la reprezentantoj de la Ligo de germanaj Esperantosocietoj en Ĉeĥoslovaka Respubliko, kiuj lasttempe venis al sinjoro ministro, tiu ĉi respondis, ke li decidigis permesi instruadon de Esperanto en ĉiuj lernejoj, kiuj por tiu celo havas konvenajn instruistojn. Al ĉiuj lernejoj, kiuj al li sendos koncernen petskribon, oni permesos instruadi Esperanton provizore por unu jaro kaj post tiu tempo oni petos la lernejan inspektorojn prezenti raporton pri la rezultato de tiu ĉi instruado. Laŭ la atingita rezultato oni decidos definitive pri la sorto de Esperanto en niaj lernejoj.

Ĉi tiun sorton havas en la manoj niaj instruistoj. Ili devas pruvi, ke tiu ĉi unu-jara sufiĉas ke la lernantoj ellernu ne nur esperante legi kaj kompreni, sed eĉ flue paroli. Ke ili tion provos, ni ne dubas. Sed ili eĉ havas okazon pruvi, ke la scio de Esperanto helpas al la lernantaro disvastigi ĝiajn sciojn geografiajn kaj konon de la vivado en aliaj landoj, se ili ebligas al la lernantaro korespondi kun la lernantoj de tiuj lernejoj en fremdlando, en kiuj oni instruas Esperanton. Per tiu ĉi rilato kun la lernantaro de fremdaj ŝtatoj oni multe vastigos la penshorizonton de niaj knaboj kaj knabinoj, kaj ili tiamaniere baldaŭ fariĝos informantoj pri nia nacio, en fremdlando ĝis nun tre malmulte konata.

se tak stalo. Ministru vyučování panu G. Habrmanovi byly zaslány žádosti spolků a svazů esperantských, ba i učitelských, aby uvedl Esperanto do škol měšťanských a středních. Tyto žádosti došly nejen ze strany Čechů a Slováků, ale i Němců a též maďarští esperantisté ze Slovenska rozhodli se vyslati k panu ministru deputaci se stejným požadavkem.

Zástupcům Svazu německých spolků esperantských v Československé republice, kteří v poslední době se k panu ministru dostavili, sdělil tento, že rozhodl se povolit vyučování Esperanta na všech školách, které mají k tomu schopného učitele. Všem školám, které mu zašlou příslušnou žádost, bude povoleno vyučování Esperantu zatímně na jeden rok, po kterémto době budou vyzváni školní inspektoři, aby podali zprávy o výsledku tohoto vyučování. Dle dosaženého výsledku rozhodnuto pak bude definitivně o osudu Esperanta na našich školách.

Tento osud mají v rukou naši učitelé esperantisté. Oni musí dokázat, že tento jediný rok postačí, aby žáci naučili se Esperantem nejen číst a rozumět, ale i plyně hovořit. Že tento důkaz provedou, o tom nepochybujeme. Oni však mají možnost dokázat i to, že znalost Esperanta pomáhá žactvu k rozšíření vědomostí zeměpisných i znalostí života v zemích jiných, pakliže umožní žactvu korespondenci se žáky těch škol v cizině, v nichž Esperantu se vyučuje. Tímto stykem s žactvem cizích států značně se rozšíří myšlenkový obzor našich hochů a děvčat, ale oni záhy se tak stanou šířiteli zpráv o našem národě, do sud za hranicemi tak málo známém.

ESPERANTISMO

XII. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hago, 8-15 aŭgusto 1920.

Tri komunistoj.

Honora Komitato. - Estas ankoraŭ varbitaj:

S-ro F. Coops-Broese van Groenou,

S-ro Mr. A. J. E. A. Bik, eks-urbkonsilanto, estraro de la Haga Porfremdula Societo.

S-ro Prof. D-ro H. Bliuk, prof. ĉe la Agrikultura Universitato en Wageningen; prezidanto de la Societo por Ekonomia Geografio.

S-ro Cyriel Buysse, verkisto.

S-ro D-ro J. A. Cramer, predikisto ĉe la Nederlanda Reformita Eklezio.

S-ro D-ro L. Deckers, roman-katolika parla-

mentano; membro de la Alta Laborkonsilantaro.

S-ro Edo Finnen, sekretario de la internacia metia ligo kaj de la internacia transport-laborista federacio en Amsterdam.

S-ro P. H. van der Ley, direktoro de la Edekejo por instruistoj en Haarlem.

S-ro Barono F. W. C. H. van Tuyll van Srooskerken, prezidanto de la Nederlanda Porfremdula Societo.

S-ro Ds. J. C. Wannée, liberreligia predikisto.

S-ro A. W. E. Weijerman, direktoro de la Haga Tramvoja Societo.

Garantia Fundo. - Ni danke notis la jenajn enskribojn po 25 guldenoj: S-ro S. van Broese van Groenou, Hago (1); S-ro W. Broese van Groenou, Sr., Hago (8); S-ro John Gabriëk Rotterdam (1); S-ro G. van Heek, Hongo (1); S-ro W. F. Lutter, Hago (1); S-ro D. E. Romein, Drumpt apud Tiel (1); S-ro J. W. Schvenhuijsen, Haarlem (1); S-ro A. de Vries

Vlaardingen (1). Entute 18 enskriboj, sume fl. 450, ĉiuj de Nederlando. Esperable la enskriboj de eksterlandanoj ekalvenos.

Donacoj. — Kun multa danko ni ricevis la jenajn donacojn, ĉiuj el Nederlando: S-ro Mr. A. J. E. A. Bik, Hago, fl. 10; S-ro W. Broese van Groenou Sr., Hago, fl. 50; Centra Esperanto-Librojo, Hago, fl. 5; Grupo »Fine ĝi venkos«, Hago fl. 10; Hago Tramvoja Societo fl. 150; S-ino S. van Rees-Broese van Groenou, Hago fl. 25; S-ro D. F. Romein, Drumpt apud Tiel, fl. 15; S-ro K. Schuurman, Hoogkarspel, fl. 2; S-ro W. Zwagers, Rotterdam, fl. 15. Entute 282 guldenoj. Ni varme instigas niajn plibonstatajn samideanojn ne nur pagi kotizon, sed krom tio ĝojigi la kongreskomitaton per mondonacoj. Ili ja permesos al ni fari elspezojn, kiujn la tro limigita buĝeto, fiksita je kotizoj po 10 guldenoj (kio obligas nur la necesajn kostojn) ne permesas.

Provizoraj prezoj. — Diversaj samideanoj jam petis al ni informojn pri la diversaj prezoj por la restado en Hago dum la kongressemajno. Estas la tasko de la enloĝiga komisiono, post detala esplorado, fiksi klastarifon por la elspezoj de loĝado kaj manĝado. Sed tiu grava laboro ne ankoraŭ estas finita. Tamen, por provizore kontentigi la scivolemulojn, ni estas rajtigitaj komuniki, ke la minimumaj prezoj verŝajne estos: Transnoktado kun matenmanĝo fl. 3, lunĉo fl. 2 kaj vespermanĝo fl. 3, kune fl. 8 po tago kaj po persono. La rilata komisiono verŝajne sukcesos aranĝi komunajn lunĉon kaj vespermanĝon. Oni atentu, ke depost la militigo, la prezoj por vivonecesajtoj en nia lando proksimume duobliĝis.

Kotizoj. — En nia unua komuniko, ni klarigis, ke por komplezi al samideanoj el landoj kun tre malfavora kurzo je Nederlando, ni volus akcepti kongresaliĝojn kun permeso prokrasti la pagojn ĝis en majo, kiam espereble la kurzoj estos iom pli favoraj. Kompreneble ni aranĝis tion por neriĉaj kongresanoj. En kiu ajn lando oni loĝas, oni helpos nin plej efike per tuja, kaj ne per prokrasita pago de la kotizoj.

La kongressekretario:

J. L. Bruijn.

Kvara komuniko.

Honora Komitato. — Estas ankoraŭ varbitaj jenaj sinjoroj:

Jhr. Mr. E. van Beresteijn, liberaldemokrata parlamentano, en Hago.

H. J. van Ginkel, teozofia kaj framasona verkisto, en Amsterdam.

Prof. J. G. de Jongh, rektoro magnifika de la Nederlanda Komerca Universitato, en Rotterdam.

B. Lansink, Sr., sekretario de la Nacia Labor-Sekretariejo, en Amsterdam.

A. Pieters, prezidanto de la Nederlanda Voĝo-Societo, en Hago.

Loka kongreskomitato. — La Prezidanto, S-ro J. R. G. Isbrücker, nun loĝas: van Beverningkstraat 10, en Hago. Eksigis S-ro H. Laarhoven, delegito de la Hago Roman-Katolika Esperantista Societo, kiun anstataŭas S-ro H. B. Alkemade. Aliĝis S-roj J. Diebl kaj K. H.

Meijer, estraranoj de la Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj.

Komisionoj. — La sekretarioj de la formitaj komisionoj estas la jenaj:

Diservoj: a) Protestantaj: F-ino N. Boon, Kranenburgweg 9a, Hago; b) Roman-Katolika: S-ro F. Marrevec, Kepplerstraat 28, Hago.

Distrajoj kaj festajtoj: S-ro M. P. de Wilde, Christiaan de Wetstraat 34, Hago.

Enloĝigoj kaj manĝoj: S-ino J. C. Isbrücker-Dirksen, van Beverningkstraat 10, Hago.

Propagando: S-ro J. Diebl, van Bassenstraat 27, Hago.

Provizora festprogramo. — La komisiono por distrajoj kaj restaĵoj ellaboris jenan festprogramon, kies realigo grandparte dependos de la tempo neokupita por kongreslaboroj kaj kunvenoj:

- 1e Ekskurso per vaporboato de Leiden al la fama »Kagermeer« (lago).
- 2e Muzikvespero en la »Kurhaus« (ĉe la murbordo).
- 3e Promenado tra la Hago Arbaro kaj vizito al la »Huis ten Bosch« (Palaco en la Arbaro).
- 4e Vizito al la Pacpalaco, sekvoita de veturado tra Hago per ornamitaj tramveturiloj.
- 5e Koncerto en la Hago Arbaro.

ooo

KURSA LERNOLIBRO

aplikita al la metodo de M. D. Berlitz.

Unua leciono.

Objektoj: La krajono, la libro, la papero, la plumo, la tablo, la seĝo, la tabulo, la bildo, la muro, la planko, la plafono, la pordo, la fenestro.

Kio estas tio? — La krajono, la libro, k. t. p.

Ĉu tio estas la papero? — Jes, tio estas la papero. Ne, tio ne estas la papero.

Ĉu tiu estas la libro? La krajono, la tablo? k. t. p.

*

Koloroj: blanka, nigra, flava, ruĝa, verda, blua, bruna, griza.

La krajono estas ruĝa. La libro estas bruna. La papero estas blanka, la muro estas griza kaj blua. K. t. p.

Kia estas la tablo? — Ĝi estas bruna.

Ĉu la tablo estas bruna? Jes, ĝi estas. Ne, ĝi ne estas.

Kia estas la muro? — Ĝi estas griza kaj blua.

Ĉu la plafono estas blanka aŭ griza? — Ĝi estas blanka.

Ĉu la papero estas ankaŭ blanka? — Jes, ĝi estas.

Tiu-ĉi krajono estas nigra kaj tiu estas bruna.

Tiu-ĉi libro estas ruĝa kaj tiu estas griza.

Kia libro ĝi estas? — Ĝi estas la ruĝa libro.

Kia kraĵono ĝi estas? — Ĝi estas la nigra kraĵono.

Kia kraĵono tio estas? — Tio estas la nigra kraĵono.

Kia seĝo tio estas? — Tio estas la bruna seĝo.

Kia tablo tio estas? — Tio estas la griza tablo. K. t. p.

Dua leciono.

Dimensioj.

La nigra kraĵono estas longa; la ruĝa kraĵono ne estas longa, sed ĝi estas mallonga. — Kiu kraĵono estas longa? — Kia estas la longa kraĵono? — Kiu kraĵono estas mallonga? — Kiu kraĵono estas nigra, la longa aŭ la mallonga?

La bruna libro estas larĝa; la ruĝa libro ne estas larĝa, sed ĝi estas mallarĝa. — Kiu libro estas larĝa? — Kiu libro estas mallarĝa? — Kia estas la larĝa libro? — Ĝi estas bruna. — Kia estas la mallarĝa? — La mallarĝa libro estas ruĝa. — Kiu libro estas larĝa, la ruĝa aŭ la bruna?

La bruna libro estas longa kaj larĝa, ĝi estas granda. — La ruĝa libro estas mallonga kaj mallarĝa, ĝi estas malgranda. Kiu libro estas granda? — Kiu libro estas larĝa? — Kiu estas malgranda? — Ĉu la ruĝa libro estas granda aŭ malgranda? — Ĉu la granda libro estas ruĝa aŭ bruna? — Ĉu la malgranda libro estas ruĝa aŭ bruna? Ĉu la granda libro estas ruĝa?

La bruna libro estas dika, la ruĝa estas maldika. Kiu libro estas dika? — Kiu estas maldika? — Kiu libro estas dika, la ruĝa aŭ la bruna? — Kiu libro estas ruĝa, la dika aŭ la maldika? — Ĉu la bruna libro estas dika aŭ maldika?

Longa, pli longa, plej longa. Tiel — kiel.

La nigra kraĵono estas longa kaj la bruna estas ankaŭ longa. La nigra kraĵono estas pli longa ol la bruna. — Kiu kraĵono estas pli longa? — Ĉu la bruna estas pli longa? — Kiu libro estas pli mallonga, la bruna aŭ la ruĝa? — Ĉu la muro estas pli longa ol la tabulo?

La ruĝa libro estas pli mallarĝa ol la bruna. — Ĉu la bruna libro estas pli larĝa ol la ruĝa? — Ĉu la tablo estas pli larĝa ol la seĝo?

La blanka papero estas pli granda ol la verda. La verda papero estas pli malgranda ol la blanka. — Kiu papero estas pli granda, la blanka aŭ la verda?

Kiu libro estas pli dika, la bruna aŭ la ruĝa? — Ĉu la ruĝa libro estas pli dika ol la bruna?

La muro estas pli granda ol la tabulo; la tabulo ne estas tiel granda kiel la muro, ĝi estas pli malgranda. — La plafono estas tiel granda, kiel la planko. — Ĉu la tabulo estas tiel granda, kiel la muro? — Ĉu la tablo estas tiel granda, kiel la seĝo? — Ĉu la plafono estas tiel granda, kiel la planko? Ĉu la ruĝa libro estas tiel granda kiel la bruna?

La nigra kraĵono estas, pli longa ol la bruna, la bruna kraĵono estas pli longa ol la ruĝa. La nigra kraĵono estas plej longa.

Kiu libro estas plej granda, ĉu la bruna, aŭ la nigra, aŭ la ruĝa? — Kio estas plej malgranda, ĉu la kraĵono, aŭ la plumo, aŭ la kreto?

La tablo estas alta, la seĝo estas malalta. La fenestro estas pli malalta ol la plafono. La pordo estas pli alta ol la tabulo. Ĉu la tablo estas tiel alta kiel la tabulo? — Kio estas pli alta, la fenestro aŭ la pordo?

La bruna kraĵono estas malpli longa ol la nigra. La ruĝa kraĵono estas malpli longa ol la bruna. La ruĝa kraĵono estas malplej longa. — Ĉu la bruna kraĵono estas malpli longa ol la nigra? — Kiu kraĵono estas malplej longa, ĉu la ruĝa, aŭ la bruna, aŭ la nigra? (Daŭrigo.)

ooo

ESPERANTO KAJ LA INTERPOPOLA LIGO — NOVA SERIOZEGA TASKO!

Mi demandas vin, karaj samideanoj, ĉu vi volas propagandi la internan ideon de l'Esperantismo kaj: ĉu vi kredas, ke la ideo de l'Interpopola Ligo iam venkos? Vi tuj respondos: Jes! nature! certe! tre volonte! Vi konsentos, ke la du demandoj por vi estas ne du, sed nur unu: ĉar la unu ampleksas la alian. — Ni ne volas disputi hodiaŭ kiel politikistoj, kaj pro tio ni ne volas diskuti la demandon: kio mankas al tia institucio, kiu nun estas nomata Interpopola Ligo, kiel ĝi ŝajnas tre ofte esti nur karikaturo. Ni ĉiuj scias, kion ni volas, celante tiun ligon! Malgraŭ la malbonaj spertoj, fari-taj dum la pasinta tempo, ni asertas, ke la ligo jam ekzistas. Ankaŭ lingvo jam ekzistas, povonte disbati »la obstinajn barojn« kaj difaligi murojn de miljaroj inter la popoloj dividitaj.

Neniam la kondiĉoj, labori por niaj ideoj, estis tiel favoraj, kiel hodiaŭ! Do, neniu el ni

tutmonda Esperantistaro havas la rajton, plendi pro la nekompreneblo rilate al niaj ideoj. — Certe ni havas ankoraŭ tre multajn kontraŭulojn, bedaŭrinde eĉ en la ŝtataj kaj urbaj registaroj, sed la postmilita situacio vere estas la jena: »en la mondon venis nova semo.«

La amikoj de l' vera internacia repaciĝo devas aliĝi de la unu limo de l' tero ĝis la alia. Kaj ni devas esti la gvidontaj. Ĉir veniu havas tiel »fikan rimedon, kiel ni, posedantaj la veran mondhelpingvon. Ĉie oni treege klopodas pro la vera Interpopola Ligo, sed nur malmultaj de la propagandistoj de tiu afero scipovas Esperanton. Do, ni fondu en ĉiuj landoj kaj nacioj Esperantajn komitatojn!

En Germanujo tia Esperanto-Komitato jam ekzistas, interrilatante kun la Germana Anaro de l' Interpopola Ligo. En Francujo — laŭ konfidindaj sciigoj — tia komitato ekestas. Pri neesperantaj anaroj en multaj landoj ni jam estas instruitaj, sed pri kelkaj nacioj ni ĝis nun ne sciigis, ĉu en ili la propagando por la Interpopola Ligo ekzistas kaj progresas. Pro tio — ni ripetis — oni fondu ĉie naciajn Esperantistajn anarojn de l' Interpopola Ligo, kiuj klopodu pri internaciaj interrilatoj. Ozi skribu al la referatulo de nia komitato (Vice-Poŝtdirektoro O. Rieck en Greifswald) tuj, kiam oni fondis komitaton en iu ajn nacio, por ke li povu raporti pri la progresoj en la gazeto de nia UEA »Esperanto« en Bern kaj en la gazeto »Unuigita Tuthomaro«. Al ĉiu alia redakcio, kiu volas ricevi tiun raporton ni sendos ĝin tre volonte. Espereble dum la Haaga kongreso povos okazi kunveno de la naciaj Esperantaj Komitatoj de l' Interpopola Ligo, kiun partoprenu almenaŭ unu samideano el ĉiu nacia komitato.

Se nia majstro Dro Zamenhof ankoraŭ vivus, li certe fariĝus la »centro« de Tutmonda anaro de l' Interpopola Ligo — ni agu, ni laboru serioze en liaj intencoj kaj danriĝu liau laboron! Ni pripensu la vortojn de nia himno, ŝanĝante ilin nur rilate al unu litero:

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝu pacaj batalantoj!

La Esperanta Komitato de la Germana Anaro de l' Interpopola Ligo (Deutsche Liga für Völkerbund):

Prof. P. Christaller, Stuttgart. Prof. D-ro. J. Dietterle, Leipzig. A. Junker, Köln. Vice-Poŝtdirektoro O. Rieck, Greifswald. Sekreta Konsilanto Prof. D-ro. A. Schmidt, Potsdam (Berlin). Bankdirektoro D-ro Vogt, Augsburg.

MARIE BROŽÍKOVÁ.

La 18. de marto mortis post dutaga malsano kaŭze de komplikita gripo sinjorino Marie Brožíková, komitatmembro de Esperantista klubo en Plzeň, kaj edzino de nia ekspedisto so. Jos. Brožík. La mortinta sinjorino estis unu el plej viglaj membroj de la klubo. Ĉiam gaja, tre inteligenta, sentema kaj parolema ŝi helpis al intimeco de la klubaj kunvenoj, kie ŝi estis eksterordinare ŝatata de ĉiuj klubaj membroj.

Ŝia perdo estas por la klubo tiom pli dolora, ĉar ankoraŭ kvin tagojn antaŭ sia morto ŝi ĉeestis sana kaj ridanta la kluban kunvenon — kaj post unu semajno akompanis ŝin la membroj de la klubo sur ŝia lasta vojo... La mortinta sinjorino postlasis okmonatan filineton kaj sepjaran fileton. — Ripozu bone, neforgesebla amikino nia!

Al la funebra edzo ni esprimas veran kunsenton en lia granda doloro.

La Progreso.

DIVERSAĴOJ

La Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista estis fondita la 1. de februaro. Tiam okazis ĝia konstituanta ĝenerala kunveno en Praha, en salono de kafejo »Louvre«, kiun ĉeestis multaj esperantistoj el Bohemio, Moravio eĉ Slovakio. En la komitaton estis elektitaj esperantistoj ĉeĥaj, slovakaj kaj unu Magiario. Prezidanto estis so. reg. kons. J. Eiselt el Praha, vicprezidanto so. prof. dr. St. Kamaryt el Bratislava, ĝenerala sekretario estas so. Rud. Hromada el Praha kaj sekretarioj so. Svačina, instruisto en Budějovice kaj prof. R. Fridrich el Prostějov. — La statuto de la nova asocio destinas ke kiel ĝiaj membroj povas esti nur individuoj kaj ne societoj. La individuoj povas grupiĝi en lokaj kluboj. La lokaj kluboj (aŭ societoj) pagas por ĉiu sia membro al la centra kaso 6 Kč, izolitaj individuoj pagas 12 Kč. Per tiu ĉi arango oni volas instigi la izolitajn esperantistojn formi klubojn aŭ aliĝi al la esp. kluboj kaj societoj nun ekzistantaj.

Esperanto en lernejoj. La Ligo de germanaj Esp.-societoj en Ĉeĥoslovaka respubliko sendis deputacion al la ministro de instruado kaj de nacia kulturo so. G. Habrman por peti enkondukon de Esp. en la ĉeĥoslovakiajn lernejojn. La deputantojn: sojn. prof. Murath el Dux kaj dr. Guth el Teplitz prezentis al so. ministro, so. Tittel, red. de »La Progreso«. So. ministro anoncis al la deputacio sian decidon, pri kiu ni parolas en nia nuna ĉefartikolo. Laŭ tiu ĉi tute kontentiga rezultato dependas la enkonduko sole de kapabloj de niaj instruistoj. Laŭ la sciigoj al ni senditaj oni komencis instruadi Esp. jam en multaj lernejoj kaj en kelkaj la instruadon oni permesas eĉ en komunumaj (unuagrada) lernejoj kiel nedeviga instrua objekto. De kelkaj flankoj ni ricevis plendon de niaj instruistoj, ke la lernejoj direktoroj kaj lernejoj konsilantaroj kontraŭstaras la enkondukon. Tiel okazis ankaŭ en Plzeň, kie tamen post nia intermikso estis la instruado senprokraste permesita. Simila plendo venis ankaŭ de niaj germanlingvaj samideanoj, kies enhavon ni anoncis al so. ministro. — Ĉiujn malhelpojn oni al ni anoncis kaj ni penas ilin forigi.

Instruista societo »Esperanto« en Vieno prezentis al la Aŭstria Ŝtata ofico por instruado sian petskribon pri enkonduko de Esp. en lernejojn. Nun ĝi ricevis sciigon, ke la ofico permesos privatkursojn en ĉiuj duagrada lernejoj kaj en superaj klasoj de lernejoj ko-

muumaj. La societo devas prezenti petskribon, por ĉiu kurso aparte, al la lauda lerneja konsilantaro, kiun la Stata ofico samtempe informis, ke ĝi ne kontraŭstaru la aranĝadon de tiuj kursoj. La lernejdirekcioj estas atentigitaj, ke ili rekomendu la lernadon de Esperanto en tiuj kursoj. Tiu ĉi respondo signita per numero Z. 13405/19 estas subskribita de la ŝtata subsekretario so. Glöckel.

Kunveno de Moravia esperantistoj okazos dum Pasko en Olomouc en hotelo Merkur. La programo estas priesperanta kaj amuza.

So. Eduard Kühnel, iama redaktoro de «Časopis Českých Esperantistů» estis nomita direktoro de Ĉeĥoslov. konsulejo en Madrid. Antaŭ la milito li alveturis en Parizon por ĉeesti la Dekan, sed la ĵus eksplodinta milito malobligis al li la revenon en Bohemujon. Li venis en Hispanion, kie la samideanoj obligis al li vivekziston. Ĉar sendi al li la monon en lia hejmo ne estis eble. Tiel li ellernis la lingvon hispanan kaj konatiĝis kun la enlanda vivo tiel. Ke la ĉeĥoslovaka ministro por eksterlandaj aferoj decidigis uzi lin por reprezenti Ĉeĥoslovakion en Hispanio. So. Kühnel estis dum longaj jaroj la ĉefa gvidanto de esperantista movado en Bohemio kaj liaj meritoj pri ĝi estas tiel grandaj, ke oni ilin neniam povas forgesi. — En lia nova ofico ni deziras al li plej grandan sukceson, esperante, ke li daŭre restos amiko kaj helpanto de la esperantista movado en la suna kaj admirinda Hispanio.

Por la sepdeka naskiĝdato de so. T. G. Masaryk, la unua prezidanto de nia respubliko, ni eldonis interkonsente kun la min. por eksterlandaj aferoj, spec. numeron de La Progreso. Ĉiu fremdlanda samideano povas ĝin senpage ricevi de nia administracio. Samtempe ni eldonis poŝtkartojn kun bildo de prezidanto Masaryk kaj kun mallongaj esp. notoj pri li. Ĉi tiuj vendas nia administracio por la sekvantaj prezoj: 1 peco 30 hal. 10 pecoj 2,70 Kč. 100 pecoj 24 Kč. Ni ilin rekomendas speciale por eksterlanda korespondado. La bildo estas tiom bela, ke la urbeŝtaro de Plzeň petis nin pri la prunto de la klišaĵo, laŭ kiu ĝi lasis pretigi bildojn, kiujn oni nun vendas por profilo de bonfaraj entreprenoj.

Magiario, ne Hungario. La Ĉeĥoslovaka ministerio de instruado kaj nacia kulturo atentis ĉiujn oficojn de la respubliko, ke la geografia koncepto sub la nomo «Hungario» deŝt la subskriba de la packontrakto ne plu ekzistas kaj tial ke estas necese de nun uzi la sole justan nomon «Magiario».

La eldono de nia festnumero kaŭzis la malfruigon de tiu ĉi numero. La legantoj bonvolu nin senkulpigi pro tio.

Adresaro de Esperantista Klubo en Praha ne aperos, ĉar la adresoj kolektigadis malrapide kaj la prezoj de la preso altiĝadis tiel rapide, ke la publikigo sen gravaj perdoj ne estas ebla. Tial la Klubo faris aranĝon kun B. E. S. en Moravany, kiu konsentis publikigi ĉiujn kolektitajn adresojn sen plua pago en nova eldono de sia bela adresaro. Tiu adresaro aperos en fino de marto kaj niaj enskribintoj rajtos aĉeti ĝin kun rabato de Kč 1.—, tiel ke ili nenion perdos.

2a internacia foiro de Frankfurt apud Majno okazos de la 2a-11a de majo 1920. La listoj pri la enlanda aliĝantaro estas jam fermitaj; per la eksterlando oni ankoraŭ akceptas aliĝojn tiel longe kiel loko kaj tempo tion permesos. Unu el la ĉefaj avantaĝoj de la foiroj de Frankfurt a. M. konsistas en tio, ke ĉiuj foirdomaj grupiĝas ĉirkaŭ la konata festhala, reprezentanta la ĉefan foirkonstruaĵon, aŭ troviĝas almenaŭ en ĝia senpera proksimeco. Tiamaniere koncentriĝas la foirtrafiko je unu punkto kaj ĉiuj ekspoziciantaj industrioj havas samgrandan profiton el la fremda vizitantaro. La multnombraj domoj plimultiĝos ankoraŭ per la foirdomo «Offenbach» granda duetaĝa novkonstruaĵo. La Foiroficejo por la Internacia Foiro de Frankfurt a. M. forsendis la invitojn en 9 lingvoj kaj en Esperanto. Krome ĝi eldonas regule propran duonmonatan ĵurnalon «Foirgazet». Futuresuloj sin turnu al: Messamt, Esperanto-Werbestelle, Festhalle, Frankfurt a. M., Germanujo.

La Foiro de Lyon. La printempa Foiro de Lyon okazos de la 1. ĝis la 15. marto, kaj entenas pli ol 40 laŭprofesiajn grupojn: hejtiloj, heligiloj, hemiaĵoj, kuraciloj, ĥirurgiloj; teksaĵoj, vestaĵoj, mebloj; feloj, vitroj, porcelanoj, paperoj, presaĵoj, skribmaŝinoj, fotografiloj; aeroplanoj, aŭtomobiloj, bicikledo; ĉasiloj, juveloj, horloĝoj, muzikiloj, dekoraciaĵoj; teknika kaj industria instruado; reklamado, veturado kaj turismo; k. c. Ni memorigas la devizon de la Foiro: «Maksimuma negocado en minimuma spaco dum minimuma daŭro por minimuma kosto». Ni petas ĉiujn Esperantistojn, kiuj intencas viziti la Foiron, ke ili antaŭe informu la Lyonan Delegitaron de U. E. A. pri siaj intencoj: ni faros ĉion eblan por faciligi kaj pliprofitigi iliajn entreprenojn. Ni esperas, ke Esperanto havos propagandan ekspozicion en budo de la Foiro sur la placo Bellecour aŭ sur la placo Verdun. Ni petas, ke ĉiuj Esperantistaj komercistoj kaj industristoj sendu al ni du ekzemplerojn de siaj katalogoj kaj prospektoj en Esperanto (kiuj estos senpage elmontrataj kaj eventuale disdonataj reklamilojn en nacia lingvo (preĉeje en franca, kiuj informus ke ili uzas Esperanton). Ni danke ricevos ankaŭ gvidlibrojn. Kunveno de U. E. A. okazos vendredon vespere 12. marto por akcepti la fremdajn Esperantistojn. La Lyon'a Delegitaro de U. E. A. (en la Esperanto-Oficejo, 36 rue Victor Hugo, interetaĝe) kontraŭ respondkupono donas senpagajn informojn pri la Foiro de Lyon. — L. P.

Adreso por la leteroj: en la Esperanto-Oficejo, 36, Rue Victor Hugo, Lyon.

KRONIKO

Plzeň. Esperantista klubo aranĝis la 28. de feb. sian XV. ĝeneralan kunvenon. Por prezidanto oni elektis son. ing. Novák, direktoron de la urba elektraĵo en Plzeň. Ĉiĉprez. estas so. Jos. Horák, garnizona kapelestro, sekret. so. B. Tittel, red. de «La Progreso», protokolisto so. Hahn, instruisto, kasisto so. Inc. Gros, bibl. so. Al. Loukota, arĥiv. so. J. Brojfk, revuisto so. Kavan, Anstataŭantoj: sino. M. Brožiková, sino.

Kubásková kaj so. Em. Kubásek. Revizoroj: soj. Pavlík, Zikan kaj Starý. La ĝen. kunveno aprobis la proponojn aliĝi al la Ĉeĥoslovaka asocio esp., aĉeti aŭ lui komercan elmetejon en iu ĉefa strato de Plzeň por reklamaj celoj, aprobis la preliminaron de La Progreso kaj esprimis konsenton kun ĝia spirito. La klubo destinis 150 Kč por aĉeti esp. libroj, kiujn oni donos kiel premiojn al la plej bonaj lernantoj de Esperanto en la II. burĝa lernejo en Plzeň, parto orienta. — La XV. jara ekzisto de la klubo estis festita la 6. de marto en la koncertsalono de hotelo Svoboda. Kunhelpis Kantista sekcio de societo Sokol en Plzeň-Karlovo, muzika kvarteto de la urba teatro kaj humoristoj fratroj Koucký.

Praha. Esp. Kl. aranĝis kursojn en ĉambro de popola lernejo, dufoje semajne instruis: en elementa (90 p.) So. Hromada, en supera (10 p.) So. Lukáš. Novan superan kurson gvidas de 4/II. So. Hromada (17 p.). Klubaj kunvenoj ĉiulunde en kaf. Union (Národní tř.). La 19./I. parolado de sekretario pri UEA, kongresoj en Haag kaj en Praha. Komitato por komuna komerca lingvo. La 31/I. amuza vespero de esp. de Praha. (100 p.). Kantis F-inoj Bejlová kaj Kutová, violonludis S-ro Ledeč, membro de orkestro Bohema Filharmonio, recitis S-ro Lukáš (sian tradukojn de Vrchlický) kaj red. Weiner (trad. de Dro Schulhof). La 1./II. membroj de la Kl. partoprenis en la fonda ĝenerala kunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio esp.

Budějovice. Esp. klubo aranĝas 2 kursojn de Esp. kaj ankaŭ la distrikta kleriga asocio »Osvětový svaz« instruas Esp. en spec. kurso. De la 1. feb. estas instruata Esp. en la II. burĝa lernejo por knaboj. Ĉie instruas so faka instruisto Svačina. — En la stacidomo oni elpendis belan vitran tabulon kun reklamo pri Esp. kun sciigo pri la klubaj kunvenoj.

Pardubice. Esp. Rondeto aranĝas kurson en la Industria muzeo, kie instruas so. inĝ. Berger 25. partoprenantojn. — La 22. de feb. oni enmetis provizore la urnon kun la cindro de samideano poeto dr. St. Schulhof en malgrandan monumenton sur la hebrea tombejo apud la tombo de lia fidela amiko dro. Vohryzek. Ĉe tiu okazo aranĝitan solenon partoprenis ankaŭ la Rondeto kaj ĝia prezid. so. Poppe paroladis tie esp. — La Urno de dro. Schulhof estos pli poste definitive lokumita en la nova monumento de dro. Vohryzek.

Bratislava. La 9. de marto okazis publika parolado pri signifo de Esp. en la kunvena salono de la urba domo. Paroladis so. dro. Kamaryt slovake kaj so. Wanitsek magiare. — La 11. de marto komencis publika kurso laŭ metodo de Berlitz, en kiu partoprenas ĉiuj tri nacioj loĝantaj en la urbo (Ĉeĥoslovakoj, Magiaroj kaj Germanoj). Ĝi okazas en ĉambro pruntita de la urbestro. Instruas so. Wanitsek.

Olomouc. La 2. de marto okazis la II. ĝenerala kunveno de Esp. societo, kiu elektis jenan estraron: prez. so. Kudela, vic. so. Wolf, sekret. so. Mastný, vics. so. Eisler, kas. so. Hochman, komitatanoj soj. Neužil kaj Zatloukal. — Dum feb. dissendis la societo laŭ iniciativo de fervoja konsilanto so. Rebiček proponojn al ĉiuj fervojaj direktoj de Eŭropo pri uzado de Esp.

en reciproka skriba rilato. La direkcio en Olomouc respondis jam favore, promesante respondi esperante skribitajn leterojn en la sama lingvo. — Esp. kursoj komencis la 12. de marto kaj estas gvidataj de soj. Horák, Blažek kaj Zatloukal. Partoprenas pli ol 60 personoj. — Dum Pentekosto okazos esp. ekspozicio en Pötingeum kaj la societo danke akceptos materialon de fremdaj samideanoj. Oni ĝin adresu al: so. A. Kudela, Olomouc-Novosady.

Brno. En ĝen. kunveno de la klubo okazinta la 24. feb. estis elektitaj: so. Jar. Sítko, insp. de fervojoj por prezid., so. inĝ. Vinc. Kroužil, prof. de industria lernejo por vicprezid., so. J. Šembera, faka instruisto por sekret. — La 9. de feb. okazis parolado pri Esp. de so. inĝ. inĝ. Kroužil en la komerca akademio. — La 24. de feb. komencis publika kurso de Esp. en la burĝa lernejo gvidata de so. Šembera.

Prostějov. Kursoj en 1920: 1. Kluba (15 partoprenantoj), 2. laborista (30 p.), 3. skolta (25 p.), 4. instruistina (9 p.). Instruas fino. M. Havránková kaj so. R. Fridrich, delegito de UEA.

Zvolen. Post la parolado de instruisto so. Fr. Balíček aliĝis 40 personoj al esp. kurso. Ĉiudimanĉe okazas kunveno kun parolado. Ekspozicio de esperantajoj, esp. gazetoj, japanaj desegnaĵoj kaj libroj estas aranĝita de »Unua slovaka librovendejo Haas kaj Hašek en Zvolen«.

Přívóz. Inter la studentoj de la loka komer. a akademio propagandas tre vigle Esp. soj J. Němec kaj B. Matějka. Estis fondita esp. societo. — La 29. feb. estis tie ĉi fondita sekretario de lokaj esperantistoj. Ĉiujn informopetojn pri lokaj esperantistoj kaj pri propaganda celo respondos nia sekretario de esperantistoj, Klofáčova ul. 32.

Zlín. Pasintan monaton aranĝis Esperantista Klubo en Zlín du amuzajn teajn vesperetojn. Partoprenis pli ol cent personoj. Sro. Eduard Krěmař gvidas vesperan kurson vizitatan de 20 personoj. En la burĝa lernejo instruas soj. Kessler kaj Grünhut. Gelerntoj komencas jam korespondi kun junaj esperantistoj el aliaj urboj. Progresintaj samideanoj kunvenadas ĉiuvendre je la oka en nia klubo ejo (gastejo ĉe Klinkovský, 1. etaĝo).

ooo

ALVOKO.

La 1an de januaro, en la sama tago, kiam okazis konstituanta kunveno de ĉeĥoslovakaj esperantistoj, okazis ankaŭ datrevena ĝenerala kunveno de Ĉelĉického mírová společnost. Ĝia vicprezidanto s-ro prof. dr. J. Drachvovský malfermis la kunvenon kaj raportis pri ĝia laboro. Ĝi perigis la korespondaĵon inter la militkaptitoj en Italujo kaj igis ke ili baldaŭ revenis en sian hejmon. La internacia pacifista societo en Bern postulis, ke estu organizita granda internacia presa kancelario de paco, kiu intermetus ĉie kontraŭ imperialismo kaj soviniismo, kaj klopodus fondi internacian unuigon de militaj viktimoj. Oni proponis al milita ministrio la reformadon de la instruado en la lernejoj en la sentoj de pacifistoj, ke oni evitu artikolojn, kiuj koncernas militon k. t. p.

Do, mi vokas al vi, samideanoj! Aliĝu laŭeble al ĉi tiu pacifista societo kaj subtenu ĝin.

Se mi kunigos la laboron kun aliaj societoj de la sama tendenco, tiam nia venko pli frue venos!

Rondeto de esperantistinojn en Praha fariĝis fendanta membro de Ĉeĥĉekoha mir. společnost kaj elektis min kiel delegitinojn. Sekvu nian ekzemplon!

Ĉiujn pluajn informojn donos

Marie Moudrá,
Praha II. — 2032.

DEZIRAS KORESPONDŬ.

(La cupreso kostas 1.—.)

Střešovice 120 apud Praha (Bohemio). So. V. Kraus deziras korespondi pri kiaj ajn per leteroj kaj il poŝtkartoj.

Zlín (Ĉeĥoslovakio). So. Fr. Kessler, redaktoro, interŝanĝas p. k. marko Hildflanke, esperantaj kaj naciaj gazetojn. Li ĉiam respondos.

Zlín (Ĉeĥoslovakio). Fino. Anjo Palasova, ĉe firmo T. A. Baťa, interŝanĝas p. k. marko Hildflanke kun ĉiuj landoj.

Instruistoj — Esperantistoj! Por siaj 12—14 jaraj gelnantoj serĉas korespondantojn. So. Fr. Kessler, redaktoro en Zlín, Ĉeĥoslovakio.

Wien XV., Turnergasse 25/15 (Aŭstrio). So. Václav Starý, redaktoro, deziras korespondi pri laborista movado kaj interŝanĝas poŝtkartojn kaj p. markojn el ĉiuj landoj.

Łódz, str. Kiliuskiego 28 (Polio). So. J. Lejzerovič, deziras korespondi pri historio.

Warszawa, Sienna str. 29/7 (Polio). So. Arlekin, prezidanto de Esp. grupo »Warszawian« deziras korespondi kun ĉiulandaj esperistoj pri interesaj temoj.

Scfia, bulv. »Ferdinand« 39. (Bulgario). So. G. Gančov, finanta la studojn en gimnazio, deziras korespondi pri diversaj flankoj de la homa progresado kaj pri tendencoj de la kulturo.

N. Heľic apud Lučenec, župa Novohrad (Slovakio). So. Árpád Tóth deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj, interŝanĝas poŝtmarkojn kaj kolektas gazetojn. Li havas multajn poŝtmarkojn de Aŭstrio kaj Hungario por interŝanĝi. Ĉiam li tuj respondos.

Wiifuri Neitsiluemi, Matinkatu 6 (Finlando). So. Lauri Salmi, interŝanĝas fotografiajn, esp. »ŝlosilojn« kaj gazetojn.

Humppila Murto (Finlando). So. Elias Syrjänen sendos al vi por 50—500 vialandaj poŝtmarkoj la saman kvanton kaj valoron en finnaj kaj estonaj poŝtmarkoj. Provu ĉiuj! — Katalogon senpage.

Muglinov 85 p. Hrušov (Silezio, Ĉeĥoslovakio). So. Jos. Paša, minoficisto, deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj, precipe kun ministroj. Li ĉiam respondos.

Bahia Blanca, strato Santa Fé 77 (Argentino). So. Vincento Orlando korespondas per poŝtkartoj kaj interŝanĝas p. markojn.

Huddersfield, Netherton (Anglio). O. S. Norman Booth, vicprezidanto de »Skola Esperantista Ligo« petas esp. skoltojn skribi al li.

Genova, Via S. Luca 4—2 (Italio). La Laborista Esp. Grupo ĉe la »Camera del Lavoro« petas ĉiun, kiu deziras korespondi kun laboristoj, skribi al ĝi.

Edziĝ-propoŝo.

Bone situita ŝtata oficisto ĉeĥoslovaka deziras konatiĝi cele de edziĝo kun 20—30-jar esperantistino de kiu-ajna nacio. Kondiĉoj: Gajeco kaj bonkoreco. Absoluta diskreteco estas plene garantiata! La afablajn proponojn, seoble akompanatajn per la koncerna fotografajo, oni adresa al la redakcio de »La Progreso« sub la signo »Edziĝo«.

Esperantaj glumarkoj

de plej nova eldono, 100 pecoj po Kč 2.50, estas riceveblaj ĉe

Alojzo Janza, Žilina, Slovakio, Poŝtfolio 26.

Veŝk. informace o Esperantu

přináší brožurka J. ŠUPICHOVÉ, kterou vydá »Kroužek esperantistek« v Praze:

Uĉte se Esperantu

Cena 1 výtisku poŝtou 60 h. při větší objednávce sleva. Objednávky vyřizuje sekretářka Kroužku sl. Sidonie Dlouhá v Praze, Wilsonovo nádraží.

Dopisnice s obrazem presidenta

T. G. MASARYKA

vydala admin. »La Progreso«

1 kus 30 hal., 10 kusů 270 Kč., 100 kusů 24— Kč.

**Objednejte si slovník
Esperantsko-český**

u adm. »LA PROGRESO« v Plzni.

Cena brož. Kč 4.—, v plátně váz. Kč 7.—.

„LA PROGRESO“

en la nuna jaro kostas 12.— Kč aŭ 2— Svisajn Frankojn.

La fremdlandanoj abonon ĉe la »Universala Esperanto-Asocio«, Bern, Museumstr. 14.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská u Presis: Laborista presejo, Plzeň.